

& Esperanta geedziĝo:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 418 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (

/So dodo doSo LaLa LaMi; FaFa SoSo SoRe Mi Mi;So dodo doSo LaLa LaMi; FaFa SoSo SoTI Do Do

)×22)+

(&Strofoj:

'1 /Aperis pri-edziĝa peto ; De junulo en gazeto,...

(×:; **Ho, estu vi amiko mia ; restu kun mi en la ĉeno!**)

'2 Responde skribis junulino ; Pri samtema korinklino, -

'3 Kaj baldaŭ ili, laŭ promeso, ; Renkontiĝis ĉe l' kongreso. -

'4 Ĉar ili plaĉis reciproke, ; Geedziĝis tuj, samloke. -

'5 Ĝi estis grandioza festo ; Pro multnombra homĉeesto! -

'6 Ne multaj ĉe la pastra beno, ; Sed - multegaj ĉe l' festeno! -

'7 Kaj la kongressekretario ; Zorgis pri l' ceremonio: -

'8 Soifa Lingv'-Komitatano ; Trinkis je l' geedza sano; -

'9 Kasisto perdis sian kason ; Dum li malplenigis glason; -

'10 Kaj oni aŭdis Prezidanton ; Kanti tre petolan kanton; -

'11 Mallerta Akademiano ; Rompis glason da ĉampano:

'12 Vegetarano pro sufoko ; Glutis oston de la koko; -

'13 Kaj ĉastemulo kun plezuro ; Pinĉis en virina kruro; -

'14 Abstinenculo, ve, sen danko, ; Multe vomis sur la planko; -

'15 Entute ĉiuj festaranĝon ; Longe laŭdis kaj la manĝon...

'16 La nova paro ĝojpetola ; Tre deziris... esti sola, -

'17 Al ĉiuj do adiaŭdiris, ; Kaj diskrete ili iris, -

'18 De U. E. A. la delegito ; Gvidis ilin ĝis la lito, -

'19 Kaj tiam li, - pro bona ordo, - ; Gardostaris ĉe la pordo; -

'20 Rigardis li, pro malenuo, ; Iom tra l' serura truo, -

'21 Kaj poste sendis li, laŭ devo, ; La raporton al Ĝenevo*, -

'22 Ni legos eble pri detaloj ; en Jarlibro aŭ ĵurnaloj...